Numero: 317.
Oktobro: 2018. 26-a jarkolekto

# VESPERTO
# Literaturaj folioj





Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefono: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŜVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

# Oktobraj pensoj

Estas aŭtune. Belega aŭtuno. Mi ŝatas ĉi tiun sezonon. Ĝiaj koloroj ĉarmas min kaj mi volonte promenadas en la aŭtuna arbaro.

Diversaj pensoj zigzagas en mia kapo, de kiuj mi ne povas liberiĝi.

Jes, mi estas esperantisto. Ĉi lingvo riĉigis min. Sed de tago al tago mi sentas, ne sufiĉas nur fanfaroni pri la beleco de la lingvo.

Mem Esperanto ne povas fari pacon en la mondo. Se mankas la emo el la koro de la homo ami la alian, tiam vortoj kaj frazoj mute flugadas en la aero.

Bedaŭrinde la militantojn ne interesas Esperanto. Ili prefere prenas armilojn kaj ilia celo ne estas kompreni la malamikon.

Mi scias, tio ĉi estas malfacila afero. Nin geesperantistojn ofte trompas la ESPERO, ke ni ĉion povos superi per nia lingvo.

Laŭ mi Esperanto restu nur komunikilo per kies helpo ni povas komprenigi nin kun diverslingvaj homoj.

Ni ne deziru, ke zamenhofa lingvo faros pacan vivon. Ĝin ni faru per la varmo de nia koro.

Mi scias, nun estas kiuj koleriĝos pri mi, kial mi skribas tiel kaj mi ne entuziasme disvastigas nian lingvon. Mi kredas, mem Esperanto ne povas fari mondpacon.

Pardonu min! Neniu pensu, ke mi estas malbona esperantisto, kiu agitas kontraŭ lingvo.

Mi nur provas vidi reale nian situacion en la mondo.

Mi estas konvinkiĝanta, se ni povos liberiĝi de la rozkolora nebulo, kiu ĉirkaŭas nin, tiam Esperanto paŝos antaŭen.

Kompreneble tio ĉi ne estos facila. Komence ankaŭ mi ĝuis tiun ĉi rozkoloran nebulon kaj mi esperis, ĝi savos min de ĉio.

Bedaŭrinde mi devis seniluziiĝi kaj mi komencis novan Esperanto-epokon. Mi tre esperas, se mi iros plu sur tiu ĉi vojo, tiam por mi la Internacia Lingvo estos pli rezulta.

**— Redaktanto —**



# Kuloj

Du kuloj babiladas ĉe la bordo de frekventa lago, kiun vizitas multaj eksterlandanoj.

Ofte la lagobordo eĥas de diverslingvaj paroloj.

— Ekde lundo mi komencis lerni fremdan lingvon. Mi jam scias multe da frazoj kaj esprimoj – diras fanfarante iu kulo al sia kolego.

— Kial lerni fremdajn lingvojn? – demandas la alia, kiu nelonge revenis de sur la dorso de dika germano.

— Ĉiu moderna kulo parolas jam fremdajn lingvojn. Sen lingvoscio ni kuloj ne povas ekzisti. Lernu ankaŭ vi iun lingvon, kolego!

— Mi povas piki la klienton ankaŭ sen lingvoscio. Tio estas senutila afero.

— Vi scias. Vi ne ĉagrenu, se okazos domaĝo pro tio!

Ili forflugas por serĉi klienton.

Tiutage estas ege bona vetero. Multaj homoj ĉefe eksterlandanoj alvenas al la lago.

La kuloj povas elektadi inter la sangoplenaj homoj. Ili kontente pikadas la kuŝantojn sur la lagobordo.

Ĝis noktomezo ili dikiĝis pro multe da sango. Ili kontente, sed iom lace pritraktas la hodiaŭan laboron.

La kulo, kiu estas kontraŭ la lingvolernado diras al sia kolego:

— Sen lingvolernado ni povas labori efike. Kial elspezi multe da mono?

La alia kulo balbutante volas diri ion, kiam ĉe la lumo de la lampo ekvidas belan virinon.

Ŝi estas eleganta dezirinda kaj la okuloj de la kuloj tuj fiksiĝas al ŝi.

Ili mutiĝas, sed ambaŭ ili scias pri kio pensas la alia.

Ili tuj ekiras al la virino, kiu ankoraŭ suspektas nenion. Ŝi ankoraŭ ne vidas la proksimiĝantan atakon.

Neatendite viro paŝas el la mallumo kaj li tuj ekvidas la du kulojn.

— Karulo, sur vian dekstran ŝultron flugis kuloj – li diras ĝuste en tiu lingvo, kiun kulo lernas en la lingvolernejo. – Ĉu vi permesas, ke mi mortfrapu ilin?

La kulo, kiu kontraŭis la lingvolernadon komprenas nenion el la parolo. Sed la alia jes. En la lasta momento ĝi povas forflugi kaj saviĝi.

— Se ankaŭ ĝi lernentus fremdajn lingvojn, tiam nun ĝi ne kuŝus sur la ŝultro de la virino mortfrapita! Utile lerni fremdajn lingvojn.

**— Ŝaŝa —**



# Renkonto kun fremduloj



Tomaso neniam povis forgesi tiun nokton, kiam li renkontis fremduloj venintaj el la ĉielo.

Li sidis en la drinkejo kaj revante rakontis sian aventuron.

— Toĉjo, rakontu, kiel vi renkontis la ĉielajn fremdulojn! – petis lin kelkaj drinkokamaradoj.

Tomaso volonte rakontis, se oni pagis por li botelon da biero.

— Mi iris hejmen el la arbaro. Estis vespere kaj ĉio estis malhela. Mi ĝuste iris tra senarbarejo, kiam inter la arboj mi ekvidis lumantan objekton. Ĝi estis globforma kaj arĝentkolora.

Miaj piedoj radikiĝis en la teron. Mi timis ekmovi. Antaŭ nelonge mi aŭdis pri nifoj. Eble mi renkontis tian flugobjekton. Mi ne sciis, kion fari.Unue mi volis forkuri, ĉar mi timis, ke ili forrabos min.

Neatendite mi ekaŭdis homan voĉon:

— Ne timu! Venu ĉi tien!

Mi ne sciis, kiu vokis min. Kvazaŭ super mia kapo estus aŭdinta la parolo. Mi ĉirkaŭrigardis, sed inter la arboj mi vidis neniun.

La voĉo venis el la flugobjekto. La fremduloj vokis kaj invitis min al sia kosmoŝipo.

Mi tremis kaj tre timis. Tiam la antaŭa voĉo ripetis:

— Ne timu! Venu ĉi tien!

Kion fari? Mi heziteme ekiris al la flugobjekto.

Mi sentis, ke tiu kelkmetra irado daŭris horojn. Vere mi scias, ĝi estis nur dek sekundoj ĝis mi atingis la flugobjekton.

Kiam jam mi estis tute proksime al ĝi, subite mi ekleviĝis kaj en la sekva momento mi trovis min ene.

Mi tute konfuziĝis. Eble mi ne sciis, ĉu mi estas knabo aŭ knabino.

„Miaj gastigantoj" diris nenion. Tuj komenciĝis la vojaĝo. Ni flugis al nekonata celo. Veredire nur mi ne sciis, kien ni flugas.

Dum la vojaĝo mi perdis mian konscion. Vekiĝante mi trovis min en blanka ĉambro. Poste mi eksciis, mi estas sur la planedo X11 fore ie en la galaksio.

Mi ne sciis, kion ili deziras de mi. Ĉu ili murdos min aŭ mi estos eksperimenta kuniklo. Mi ege timis, eĉ timegis.

Longe mi estis sola en la ĉambro. Mi kuraĝis fari nenion. Mi sentis, ke ili atentas min tra la muroj aŭ per alia stranga aparato.

Post mia vekiĝo tri belaj blondulinoj kun longaj femuroj envenis la ĉambron. Unu el ili senvestiĝis. Ŝi estis tute nuda kaj kuŝiĝis apud min en la liton…

— Kio okazis poste? – demandis iu duonebriulo scivoleme. – Diru jam! Ĉu vi seksumis ŝin?

Laŭta ridego eksplodis en la drinkejo, eĉ ankoraŭ la drinkejestro ridis.

Jam ĉiu staris ĉirkaŭ la tablo de la rakontanto kaj auskultis lin.

— Se vi deziras ekscii, kio okazis, pagu ankoraŭ unu botelon da biero. Sed diru al la drinkejestro li donu la bieron el la fridujo, ĉar mi ne ŝatas la varman.

La duonebriulo iris al la vendotablo kaj petis botelon da biero.

Tomaso kontente trinkis el la botelo per grandaj gutoj.

— Nu, rakontu jam! – urĝigis lin la viro, kiu pagis la bieron.

En la drinkejo denove ĉiuj ekridis, nur la urĝiganto komprenis nenion. Li denove ripetis:

— Nu, rakontu jam! Mi volas scii, kio okazis.

Ĉe la tablo bluĉapa ulo diris ridante:


— Toĉjo renkontis fremdulojn neniam. Li nur deziris trinki botelon da biero. Li trompas ĉiun novulon, kiu ne konas lin. Li ne estas fiulo, bonvolu ne koleri pro tio!

Unue la viro preskaŭ eksplodiĝis pro la kolero, sed poste li paciĝis kaj ankaŭ li ridis.

— Mi fermas – diris la drinkejestro. – Bonan nokton!

La homoj ekstaris kaj malrapide ili ekiris al la direkto de la pordo.

**— Verkis: Apáti Kovács Béla —**



# Poezio

Ĉu infanoj legas poemojn nuntempe? Aŭ ili fingrumas sian kompufonon?

Verdire en la lernejo ili renkontas poemojn, versojn en la lernolibroj, sed mi ne scias, ĉu ilin interesas tio.

Certe estas infanoj, kiujn tuŝas tiu ĉi branĉo de la literaturo.

Mi nur esperas, ne formortos la poezio kaj ankaŭ la interesiĝon de la infanoj vekas belaj versoj.

Ivan Naumov

## Nova preĝo sub sama standardo

omaĝe al doktoro Zamenhof

Jen, flugas la nuboj.
Iliaj vualoj
Paligas falantan sunrondon.
Mi, drone en duboj,
Por ĉiuj kialoj
Bezonas respondon.

Sed ĉio silentas –
Refoje mi sentas
Nek jeson, nek neon, nek aŭon...
Zorganto Plejsenca,
Per menso potenca
Rigardu ĉirkaŭon!

Ĉielo sen kajtoj –
Ĉiamas la trajtoj
De l' olda, mortanta vespero.
Sur tombon de l'tago
Metatas repago –
Manpleno da tero.

Ĉu mondo ŝanĝitis? –
Ja revo ne mitis,
Ĝi ardis kaj flamis en koroj... –
Verŝajne, finbrulis.
Ĉar nepojn jam lulis
Aliaj sonoroj.

"Ĝi estas ne plago –
Sed, klare, destino!" –
Ni Lingvan neuzon moketas.
De tago al tago
En fera obstino
Ni Lingvon forĵetas.

Ĝi kuŝas en polvo.
Ĝi ŝimas sen solvo.
Ĝi putras sub ruĝaj kovriloj.
"Ja tago ne lastas!" –
Ni ĉion prokrastas
Por longaj jarmiloj.

De etaj rondetoj
Ni venis al re-e-etoj!!!
Ni vigle de sola Adamo
Diskreskis. Ni multas.
Sed pigras kaj stultas
En sata sinamo.

Solenis komenco,
Fajreris intenco,
Sed jen: estingiĝis ribelo.
Plu helas nur oro
De Lingva valoro:
Ĉieso kaj belo.

Ĉiela lamento
Demandojn rifuzas,
Stelaroj pikiĝas en tardon...
Ektreme pro vento,
Mi plejde ekuzas
La verdan standardon

# Por infanoj



## Mira renkontiĝo la 3a parto

La vetero estis tre ŝanĝiĝema. Se matene aperas grizaj nuboj posttagmeze pluvos eĉ okazos ŝtormeto.
Poste aperas Suno kaj aero varmiĝas tiom multe, ke iĝas pli kaj pli sufoka.
Sed pro la ofta pluvo kreskiĝis herboj.Verdiĝas naturo kie ajn oni rigardas. Kaj kie estas verda herbejo ankaŭ troviĝas diversaj floretoj, kaj arbaro aspektas mira. Gaja pepado aŭdiĝas ĉie, eĉ griloj ĉirpantaj tuttage feliĉigas ĉiujn orelojn.
Iun el tiaj tagoj la knabeto Petro decidis ekkoni sian amikinon Jana kun liaj geamikoj el la Verda Arbaro.
Li scias uzi telefonon /tion ja, panjeto lernigis lin/ kaj frumatene senpacience li alvokis ŝin.
- Jana, mi decidis ke ni kuniru Verdan Arbaron por ke vi ekkonu miajn amikojn. Ĉu vi akceptas ke ni revidu nin proksime de la enirejo de nia mira arbaro?-diris li tute certa ke ŝi akceptos lian proponon.
-Jes, ni revidu nin ĉe la unua benko ĉe enirejo. Enorde? – respondis ŝi ride. Petro kaj Jana sidis sur la unua benko ĉe la enirejo de la verda mira arbaro .
- Kia beleco – diris Petro. La herboj kreskis tre alte.Ĉu vi sentas kiel suno varmigas niajn krurojn? - demandis Petro la silentan knabinon.
- Jes, la suno baldaŭ ruĝigos la haŭton. Mi surmetis sunokulvitrojn. Panjo aĉetis ĝin por mi pasintsemajne. Ĉu ĝi plaĉas al vi? - diris Jana transdonante la sunokulvitrojn al li
- Vidu ili estas plastaj sed koloraj - diris ŝi ŝerce.
- Ho, mi havis similajn. Sekvontfoje mi kunportos ĝin Nun mi ne plu estas honta - fripone li okulsignis al ŝi.
Tiam li brue kriis –Jen, miaj amikoj.
Ĉiuj samtempe venas kun feliĉa mieno, Li montris al ŝi al la venontan gajan amikaron - bela bojanta hundo kaj duone blankmakulita kato akompanata de diverskoloraj flugantaj papilioj – deklamis Petro prezentante ilin laŭ aperado.
Jana tenere tuŝadis la katan dorson dum hundo sidiĝis lekante la manon de Petro. - Bonvenon al ni, karaj amikoj! - gaje diris kaj Jana kaj Petro.
- Venu al ni belaj papilioj! Alflugu sur ŝian nigran hararon. Estu vi kvazaŭ floretoj en ŝia hararo! Ne timu Jana, lasu ilin alflugi sur la haroj!- Petro aplaŭdis per manoj brue salutante la papiliojn.
- Estas bela vidaĵo ĉi tie. Pejzaĝo baniĝanta en la brilo de la suno, jen feliĉaj papilioj flugantaj tien alien - diris senspire Jana.
Tiam Petro ekkriis – Ho, mi tute forgesis.
- Kie estas nia birdo? Ĝi ne aŭdiĝas….Li kuris maldekstren, poste dekstren kaj antŭen, turnis malantaŭen, sed nenie vidiĝis la birdeto.

- Verŝajne io okazis al la birdeto. - Venu kamaradoj miaj, ni serĉos ĝin en tiu ĝi direkto – li diris kaj fingre montris la mallarĝan vojon kiu serpentis ĝis la unuaj arboj .

Kiam ili proksimiĝis al la arbarrando, ili rimarkis la birdeton staranta sur la hakita tiliobranĉo.
- Kial vi estas malgaja? Ni ne aŭdis vian gajan pepadon - demandis zorgeme Petro.
- Ho, tragedio, granda tragedio okazis.Iu fripono ĵetis mian neston per ŝtonĵetilo.
Nun mi devas denove kolekti branĉetojn por fari novan neston. Somero rapide pasas.

- Veras, sed ne estu malgaja.Vidu, ni faros volonte al vi novan neston. Kaj dirite farite Jana enplektigis la flekseblajn branĉetojn samkiel la panjo plektigas al ŝi longajn harligojn.

Ĉiu helpis donante po unu branĉeto.Tiel nesto ja, estis rapide plektita. Nun ĝi staras sur la trunko de hakita tilio.

- Ekestis nova problemo kiamaniere ni prenos la neston alten en la branĉaron de betulo.

Subite la papilioj forflugis timigitaj de infanaj kriaĉoj. Iuj el la grupeto de infanoj kuris por kapti la papiliojn per papiliokaptilo. Tiam ekbojis la hundo postkurante ilin kiom eble pli malproksimigante ilin de la hakita tilio.

- Kion ni atendas - diris Jana. Rapide ni decidu kion fari. Kiel ni savu la neston?

Tiam la duone blankomakulita kato eksaltis, per dentoj kaptis la neston kaj rapide surgrimpis sur betulopinton.
La kato forlasis la neston inter la branĉetoj kaj ju pli ĝi surgrimpis la betulon ĝi malsuprenigis ĝin.
Nun la kato milde rigardis surprizitan mienojn de Jana kaj Petro kiu unua etendiĝis la manojn por brakumi ĝin.

– Bela, saĝa kato! Dankon por solvita problemo. Ni ambaŭ /fingre montrante al ŝi poste al li / dankas al vi. Nia birdo estas savita. Ĝia nesto estas metita alten kaj neniu povos damaĝigi ĝin . Nu, nun ni kune gaje ekkantu ``Vivu amikeco``!

La sonorilo troviĝanta sur la urba preĝejo jam anoncis tagmezon. La infanoj ankoraŭ ĝoje ludadis malkovrante la belecon de la mira arbaro.

- Ni estas malsataj kiel lupoj. Ni devas adiaŭi de vi. Ne forgesu. morgaŭ ni revidos nin. Kaj ni preparos surprizon por vi – feliĉe aldonis Jana .

Do, ĝis la revido !
Ĝis la revido, amikoj! – eĥas arbaren dum Petro kaj Jana estas survoje revenintaj hejmen.

Verkis Mirić Jadranka Zaječar - Serbio Julio 2018



# Aviadiloj









# Aviadiloj





